

SVISA ESPERANTO - SOCIETO


INFORMAS

N-ro 3/1993

MAJO-JUNIO

P R I N T E M P O

la bela sezono, kiu varmigas la revekiĝantan naturon, kreskigas plantojn, florojn, fruktojn. Vera antaŭsigno de la baldaŭa somero.



La tri karlinoj (argenteaj kardoj) ĝuas la sunbrilon!

(fotita en la regiono de ANDEER/kantono Grisono. FL)

* * *

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BIEL:

En restoracio MANDARIN, Dufourstrasse 41.
17.30-18.30h Ĉiun vendredon.

Bellinzona: TIĈINA ESPERANTO-LIGO:

Ĉiam en Viale Motta 32, ĉiun duan sabaton en
la monato,
8.5.17.00h kaj 5.6.17.00h.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
4.5.19.30h kaj 1.6.19.30h

ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" GENÈVE:

En "INSTITUTO NACIA" ĜENEVO.
28.5.20.00h kaj 25.6.20.00h

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

En restoracio SIMPLON Habsburgerstr.16.

6.5.20.00h "kiel redakti gazetartikolon"?
Parolos Franz Brügger.

12.5.14.00h Paroliga kunveno en Big Ben, Win-
kelriedstrasse 39. Gvido: Franz
Brügger.

27.5.20.00h LITERATURA VESPERO en restoracio
Simplon. Gvidos Sonja Brun.

9.6.14.00-16.00h paroliga kunveno en Big Ben.
Gvido: Franz Brügger.

17.6.20.00h En la hejmo de gesinjoroj Dettling,
Hirtenhofstr.25a Luzern. Temo:
"Baha'i-Kredo kaj Baha'i-Centro"
Video-Bendo. Gvidos Rosa Mettler.

ESPERANTO-SOCIETO Neuchâtel:

Kunvenoj: ĉiumonate iun vendredon, laŭ eble-
co de la membroj.

ĜENERALA KUNVENO:

Pro longtempa foresto en eksterlando mi nur
nun povas malfermi la ĝeneralan kunvenon.

Jarraporto:

Dum 1992 ni kunvenis okfoje ĉe la prezidanto kaj unu-
foje ĉe s-ro R.W. Perrenoud. Ni kutimas korekti hej-
me faritajn tradukojn, laŭ jam publikigita teksto,

kiel referenco. Mi dankas al s-ro Perrenoud, kiu zorgas kaj akurate pretigas la tekstojn. Plue ni ĉiuj akceptis okaze rakonti anekdoton.

Lastan fojon ni solenis la Zamenhof-feston ĉirkaŭ komuna fonduo.

Nia maljunula grupo laboras amike kaj kviete. Ni kredas je la valoro de Esperanto, kaj ni kredas, ke foje ĝi estos rekonita kaj vaste uzata kiel helplingvo.

Dum sia vizito kaj ĵusa ĉeesto en USONO, la prezidanto, kune kun la edzino, travivis denove la malfacilecon kompreni la Usonan anglan lingvon.

Raporto kaj kasraporto akceptitaj.

-La prezidanto: A.W.-

ESPERANTOKLUBO WIL:

En restoracio Schweizerhof Bahnhofstrasse 18.

5.5.20.00h "UEA kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj".

Parolos S. Pochanke.

2.6.20.00h En proksima arbaro:

Ekskurso. Foriro de Schweizerhof je la 19.00h. Se la vetero estos maltaŭga, ni havos la programon de la 7.7. kaj la ekskurso okazos je la 7.7.

7.7.20.00h En restoracio Schweizerhof:

Kantado. Gvidos Verena Chaves-Walder.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

6.5.17.00h Varbostando en Bahnhofstrasse. Informoj Telefono 156 54 34.

10.5.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. s-ro Mutu Kuyenga rakontos pri Zairio.

13.5.17.00h Varbostando en Bahnhofstrasse. Informoj Telefono 156 54 34.

24.5.19.00h Libera kunveno en kafejo Valentino, Münsterergasse 4 (supre de Grossmünster).

27.5.17.00h Varbostando en la Bahnhofstrasse. Informoj telefono 156 54 34.

3.6. kaj 10.6.17.00h Varbostando kiel supre. Informoj telefono 156 54 34.

14.6.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. Koncerto de la orkestreto de ESZ.

17.6. kaj 24.6.17.00h Varbostando en Bahnhofstrasse.

28.6.19.00h Libera kunveno en kafejo Valentino.

ESPERANTO-SOCIETO BASEL:

En restoracio "Mägd" (en Bebbisturbe).

27.5.20.00h Monata kunveno: Andy Künzli parolos pri:
"ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO EN LA CARA IMPERIO KAJ
SOVETUNIO".

Poste li raportos pri la "SVISA ESPERANTO-LEKSIKONO".

24.6.20.00h Monata kunveno en Mägd (Bebbistube). Carlo
Nicolodi rakontos pri sia vojaĝo al Lat-
vio.

ooOoo

K O R A N D A N K O N

Okaze de la ĝenerala kunveno en Lucerno (13-an de mar-
to 1993) nia societo prezentis du proponojn:

PROPONA A:

Kreo de komisiono, kiu trastudu ĉiujn necesajn aktive-
cojn por povi prezenti al la svisaj instancoj la plej
taŭgan scenaron por la enkonduko de Esperanto en nia
lando, kiam la svisaj aŭtoritatoj decidis pozitive.

Ni dankas, ke vi akceptis nian proponon kaj ni esperas,
ke nia estraro baldaŭ realigu tiun ĉi laborgrupon.

PROPONO B:

Por havi pli grandan varbefehton per niaj regionaj kun-
venoj ni proponis alian aranĝritmon kun pli da parto-
toprenantoj.

Tiun proponon la plimulto de la voĉdonantoj malaprobis.
Kompreneble ni akceptas tiun decidon kaj ni dankas, ke
vi donis al ni la ŝancon, submeti al vi demokratmanie-
re niajn ideojn.

Ni ĝojas, se ankaŭ estonte ni havos okazon libere dis-
kuti pri diversaj proponoj dum niaj ĝeneralaj kunvenoj,
ĉar tiaj fervoraj diskutoj estas por nia movado "la
salo en la supo!"

Nome de la Lucerna Esperanto-Societo
Prezidanto: Scherer.

ooOoo

Ni funebras

Hermann Schmutz
1896 - 1993



Okaze de ĝia Ĝenerala Jarkunveno 1993 la Esperanto-Societo Basel elektis s-ron Hermann Schmutz Honora Membro. Bedaŭrinde, kiam la prezidantino vizitis lin en la Hospitalo, kie li pasigis la lastajn monatojn, por transdoni al Hermann tiun mesaĝon li jam ne plu estis alparolebla.

Hermann, kiu eklernis Esperanton en 1925 kune kun sia edzino, ĉiam aktive partoprenis

Esperanto-aranĝojn lokajn, svisajn kaj internaciajn. Kiel fervojisto li inter alie ankaŭ partoprenis multajn UEA kaj SAT Kongresojn. Ili tre ofte gastigis esperantistojn el la plej diversaj landoj kaj nia Societo ofte estis invitita.

Naskita en kam̂para medio, kie li ankaŭ pasigis sian junaĝon, lia unua laboro estis ĉe kamparano. Tio estis streĉa laboro kaj tiatempe laŭ severaj metodoj. Pro tio li de tempo al tempo ne nur ŝanĝis la laborlokon, sed ankaŭ la regionon. Li laboris en Seeland, kiel ankaŭ en la franca parto de Svislando, kie li povis prizorgi ĉevalojn. Dum militservo li estis ordon-portisto (Ordonnanz) de sia ĉefo.

Venante al Bazelo, kie li edziĝis kaj kie ankaŭ naskiĝis la sola filo Marcel, li unue laboris ĉe la fervojo. Bedaŭrinde en 1921-22 la ekonomia situacio malboniĝis kaj oni maldungis la lastalvenintojn, inter ili ankaŭ Hermann. Tiam li kune kun la edzino povis transpreni magazemon kaj pli poste li sukcesis reiri al la fervojo.

Kvankam li devenis el modestaj cirkonstancoj, li per diligenteco kaj ĉiama laboremo sukcesis plibonigi sian vivtenon kaj povis aĉeti propran domon.

Kvieta, kiel Hermann majstris sian vivon kun ĝiaj kulminoj kaj abismoj, li la 18-an de marto forlasis nin por ĉiam.

Ni konservu fidele la memoron al nia bona kaj sindonema samideano.

NEKROLOGO

REUTEMANN-KLEE Lina

Alemanino naskita la 17an de majo 1917 en St.Gallen, mortinta samloke la 26an de februaro 1992. Post la baza lernejo en St. Gallen ŝi vizitis porknabinan mezlernejon pri mastrumado, kie ŝi diplomigis (1938), kaj pli poste privatan faklernejon por dommastraj dungitinoj. Sian profesion ŝi ekpraktikis unue en Lausanne (VD) kaj Horn (TG). Dum la dua mondmilito ŝi apartenis al la civila virina helpservo. Per la lernita profesio ŝi havis la eblon engaĝigi ĉu en socialaj oficoj (ekzemple en resanigejo por tuberkulozuloj en Davos GR kaj en maljunulejo por blinduloj en St.Gallen), ĉu en la hotelfako (ekzemple en pensiono en Orselina TI). En 1942 ŝi akceptis postenon en Brugg (AG). De 1944 vivante en St.Gallen, fine ŝi transiris al la flega profesio kaj dum pli ol 6 jaroj ĝis 1952 aktivis kiel flegistino en la evangelia eklezia komunumo Tablat en St.Gallen.

Reutemann estis anino de la protestanta eklezio. En 1952 ŝi edziniĝis al |v| Karl Reutemann (filo de unu el ŝiaj pacientinoj); de 1979 ŝi estis vidvino; patrino de 3 filinoj. Ŝi ĉiam interesigis pri politiko, sed neniam aliĝis al iu partio. Ŝatokupoj: muziko, libroj. Dum kelkaj jaroj ŝi apartenis al kanthoro.

Reutemann esperantistigis en 1933 kiel lernantino en la porknabina mezlernejo Talhof post informa prelego de la tiama prezidanto de Esperanto-Klubo St. Gallen. Ŝi ekpraktikis la lingvon en sia lernejo post la fino de la ordinaraj lecionoj (la urbo pagis la kursgvidantaron, kiu estis instruistino en apudprofesia kleriga lernejo kaj membro de la Esperanto-klubo). Ĉirkaŭ 1936/37 ŝi akiris la ateston pri lernado de Esperanto-Klubo St.Gallen, en 1949 la superan diplomon de Svisa Esperanto-Societo (SES) post feriokurso kun ekzamenoj (Häberenberg, Huttwil BE). Ŝi estis aktiva esperantistino de antaŭ la dua mondmilito ĝis 1989 (de 1936 ŝi estas en rilato kun EK St.Gallen): kiam ĝia prezidanto |v| H. Kürsteiner estis ankaŭ prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

(UEA), ŝi ekhavis funkciojn de protokolantino kaj kunorganizantino de lokaj, regionaj kaj landaj kunvenoj, feriosemajnoj, prelegvojaĝoj por eksterlandanoj, ktp.; en 1963 ŝi mem iĝis prezidantino de la klubo kaj poste estis elektita ĝia honora membro. Membrino de UEA kaj SES: en la 40aj jaroj ŝi estis alelektita anino de la Centra Komitato de SES. En 1939 ŝi aliĝis ankaŭ al Kristana Esperanto-Ligo Internacia (KELI); post la unua KELI-kongreso kaj la Universala Kongreso en Malmö en 1948 ŝi komencis kolekti la izolajn membrojn kaj varbi novajn aliĝemulojn por KELI; kiam estis sufiĉe da ili, en 1951 ŝi kunfondis propran svisan KELI-sekcion. Krom tio, ŝi verkis artikolojn por la KELI-gazeto 'Dia Regno' kaj ankaŭ por nacilingvaj gazetoj pri la kongreso de Internacia Katolika Unuigo Esperantista (IKUE) en St.Gallen (1966), donis multajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj en St. Gallen; ŝi skribis nekrologon pri ĉiuj mortaj membroj de sia klubo, partoprenis multajn lokajn kaj enlandajn Esperanto-kunvenojn, 7 UK kaj 11 KELI-kongresojn kaj korespondis kun multaj gesamideanoj en pluraj landoj. Sian nomumon kiel honora membrino de SES ŝi ne plu travivis, ĉar ŝi forpasis du semajnojn antaŭ tiu evento pro kormalsano.

Kompilita de Andy KÜNZLI laŭ biografiaj sciigoj disponigitaj de la mortintino.

Ĉi-tie ni ŝatus publikigi ankaŭ la biogramon de **Karl REUTEMANN**, la edzo de Lina Reutemann-Klee, kiu same kiel sia edzino estis tre vigla samideano. Li mortis en 1979. Kvankam lia nekrologo jam aperis en Svisa Esperanto-Revuo, junia-julia numero de 1979, Andy Künzli antaŭ nelonge petis la intertempe forpasintan vidvinon kompletigi la biografion de sinjoro Reutemann, kion ŝi volonte faris.

(Aperigante tiujn du biogramojn ni ŝatus denove prui la seriozecon kaj progreson de la laboro lige kun la

leksikona-enciklopedia verko 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando'; ni realvokas ĉiujn interesatajn esperantistojn kunlabori cele al la realigo de tiu granda projekto).

REUTEMANN Karl

Alemano naskita la 23an de decembro 1910 en St.Gallen, mortinta samloke la 23an de majo 1979 pro stratakcidento. Post vizito de la porkomercista lernejo en St.Gallen li laboris dumvive en la sama firmao pri hejtado-aerumado, unue kiel korespondisto, poste kiel organizanto de la kontrolado kaj servado-riparado.

Kiel junulo li partoprenis Esperanto-kurson, sed ankoraŭ neniel ekaktivis ĝis la interkonatiĝo kun sia onta edzino Lina Reutemann-Klee; multe helpis al li lingve perfektigi ankaŭ la korespondado kun hungara samideano. Reutemann estis ano de Esperanto-Klubo St.Gallen, SES, UEA kaj KELI. Li trapasis la superan diplomon de SES kaj mem membris en la Ekzamena Komitato de SES en la 70aj jaroj. Kiam lia edzino iĝis prezidanto de EK St.Gallen, li akceptis esti ĝia sekretario. Li flegis la rilatojn kun la loka trafikoficejo kaj kun la gazetredaktoroj, mem verkante propagandajn artikolojn. Kiam la edzino donis kursojn, li ofte instruis unuopulojn, ekzemple studenton de la komerca altlernejo en St. Gallen. Por vigligi la Esperanto-vivon en la regiono, printempe kaj aŭtune li kutimis organizi ekskursojn, duontagajn ĉirkaŭ St.Gallen kaj tuttagajn en la kantonoj Appenzell, Thurgau kaj Zürich; tiuj aranĝoj altiris ankaŭ esperantistojn el aliaj regionoj. Kun sia edzino li vizitis multajn svisajn kaj internaciajn E-kunvenojn kaj kongresojn.

MONUMENTO DE L.L. ZAMENHOF



Nova monumento de L.L. Zamenhof, inaŭgurita okaze de la kvina Pacifika kongreso de Esperanto en QINGDAO en Ĉinio. Tiu-ĉi Esperanto-monumento estas la unua en Ĉinio. Ĝi staras en la ĝardeno de la Zamenhof-Hotelo.

REKOMENDINDA VIZITO

Estis antaŭ ne longa tempo. Jam matene oni vidis, ke la suno restos fidele brilanta dum la tuta tago. Dum la matenmanĝo okazis rapida decido! Hodiaŭ ni vizitu la Trafikmuzeon en Luzern. Plenaj de antaŭĝojo ni rapidis al la stacidomo kaj veturis al la bela urbo Luzern. En la trafikmuzeo leviĝis la demando, kion ni iru rigardi. Afabla gardisto donis kelkajn valorajn konsilojn. Unue ni miris pri la antaŭ nelonge disponigita tunelbormaŝino, kiu gigante staris meze de centra placo. Apud ĝi ankaŭ tia bormaŝino, sed aperanta kiel bebo, en komparo kun la tre granda fratino. Jes, tiu maŝinbebo estis uzata ĉe la konstruo de la submara tunelo inter Anglio kaj Francio. Longe ni staris, rondiris kaj en profundaj pensoj admiris la 2 objektojn.

Finfine ni ja ne volis rigardi unu vidindaĵon. Ni decidis iri al unu el la PTT-haloj. Ankaŭ tie ni trovis multon. Plej interesa estis sendube la prezentata historio, kiu prezentiĝis en longa vico da interesaj bildoj kun konforma priskribo. Esploristoj, inventistoj, gravaj okazintaĵoj promenis antaŭ niaj okuloj kaj la tempo nerimarkeble pasis. Vere ankaŭ la dua ejo estis tre vizitinda loko. Ĉar ĉiuj bonaj aĵoj estas tri, ni decidis por la planetario. Ekzakte je la 13-a horo la granda ejo iom post iom malheliĝis kaj super niaj kapoj aperis la mirinde bela ĉielo kun miloj da steloj kaj steletoj. La planetario enhavas du partojn. Ni rigardis la duan, kiu estis al ni ne ankoraŭ konata. Duonan horon daŭris la prezentado, al kiu aldoniĝis bonaj kaj valoraj klarigoj. Ni aŭdis pri multaj planedoj en apenaŭ percepteblaj distancoj de miloj da lumjaroj. Ni konsciis, ke homa vivo neniam sufiĉus atingi tiom forajn stelarojn, per al ni konataj vetureblecoj.

Ni forlasis la ege interesan lokon kaj en niaj kapoj turniĝis la magiaj kaj fascinaj bildoj.

Estis vere rekomendinda ekskurso.

-H+F L-

TUTSVISA FONDUSO SUBTENAS

INTERNACIAN KONGRESON

ORGANIZOTAN DE J E S

Por festi la 700an datrevenon de la unua alianco, kiu estis la komenco de nia ŝtato, la Fonduso "Agado-Renkontiĝo 91" tegmentis multajn agadojn popolajn (ne-registarajn). Post 1991 ĝi naskis alian fonduson: "Renkontiĝo 91 - Renkontiĝo 2001", kies celo estas financa helpo al iuj renkontiĝoj interkulturaj.

Junularo Esperantista Svislanda JES akceptos en oktobro 1993 ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds Mezeŭropan Junularan Kongreson MEJK. Tio estas labora kunveno kvartaga, kies partoprenantoj estos la estraranoj de Junularaj Asocioj el Aŭstrio, Germanio, Hungario, Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Svislando. Dudeko da junuloj partoprenos.

Kutime la landa asocio pagas la vojaĝkostojn de siaj membroj kaj la gastiganta asocio pagas la restadkostojn de ĉiuj partoprenantoj.

La estraro de JES submetis precizan priskribon kaj buĝeton (sume 2'850.-) al "Renkontiĝo 91 - Renkontiĝo 2001". La 19an de marto 1993 okazis la jara kunveno de tiu Fonduso en la kastelo de Lenzburg. La membroj unuanime ne nur konsentis pri financa helpo je sumo ekvivalenta al duono de la buĝetitaj elspezoj (laŭ statuto), sed randigis tiun sumon donante 1'500.- al JES por tiu okazontaĵo.

Estas grava agnosko al JES kaj al Esperanto en Svislando.

-MG-

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

La Chaux-de-Fonds, Svislando

Informigu kaj aliĝu ĉe:

Kultura Centro Esperantista (KCE), CP 779, CH-2301
La Chaux-de-Fonds. Tel. 039/26 74 07.

STUDAJ SEMAJNFINOJ

Maja studa semajnfino

1993 majo 29-31

Kurso A (por komencantoj): Stefano KELLER.

Kurso B (pro progresantoj): Andy KÜNZLI
(tekstostudado).

Kurso C (por lertuloj): Luigi BARBANA (Italio): En
arbaro kun arbaristo. Akompane de Claude GACOND
(Svislando).

Junia studa semajnfino

1993 junio 26/27

Kurso A: Claude GACOND:

Kurso B: Andy KÜNZLI (tekstostudado).

Kurso C: Claude PIRON (Svislando): Esperanto:
bremsoj kaj kuragiĝaj signoj.

SOMERAJ KURSOJ, PRELEGOJ KAJ STAĜOJ EN 1993 **ORGANIZITAJ DE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA,** **LA CHAUX-DE-FONDS (SVISLANDO)**

Julio 6-10: Kiel plibonigi sian stilon en verkado kaj
tradukado. Kun Tomasz **Chmielik**.

Julio 6-10: Esperanta somerkurso por diversaj
lingvoniveleoj. Kun sperta esperanto-instruisto. La
programo estas individue aranĝebla.

Julio 6-17: Pretiĝo al ekzamenoj. Kun Katalin
Smidéliusz.

Julio 10-11: Virinoj en la esperanto-literaturo: ĉu
protagonistoj? Kun Giorgio **Silfer**.

Julio 9-17: Intensiva metodologia kurso por esperanto-
instruistoj, kun Duncan **Charters**.

Julio 13-17: Esperanto, lingvo, lingvistiko. Kun Ilona
Koutny.

Julio 13-17: Esperanta somerkurso.

Julio 17-18: Ekzamenoj pri lingvokapablo je elementa kaj meza niveloj, laŭ la normoj de UEA-ILEI. Kun ekzamenantoj de ILEI.

Julio 19-23: Etnismo: fundamenteroj, problemoj kaj perspektivoj (IKEL-seminario). Kun Uwe Joachim **Moritz** kaj Daniele **Vitali**.

Julio 20-24: Lingvo en siaj socia, kultura kaj psika kuntekstoĵ (ĝemela aranĝo kun la sekvanta). Kun Ilona **Koutny**.

Julio 20-24: Sociologia aliro al la Esperanto-movado (ĝemela aranĝo kun la antaŭa). Kun Zbigniew **Galor**.

Julio 20-24: Esperanta somerkurso.

Julio 24-25: Julia studa semajnfino (kurso A por komencantoj; kurso B por progresantoj; kurso/prelego C por lertuloj: Edmond Privat, fama svisa ĵurnalisto kaj esperantisto. Tekstolegado kun Tomasz **Chmielik**).

Julio 27-31: Esperanta Somerkurso.

Julio 27-31: Esperanto-feriado por familioj. Kun Blazio **Vaha**.

Aŭgusto 3-7: Esperanta somerkurso.

Aŭgusto 3-7: La idealo de Zamenhof. Kun François **Degoul**.

Aŭgusto 3-7: Esperantistoj: ĉu kvazaŭ etno? El lingvo-kultura vidpunkto. Kun Aleksandro S. **Melnikov**.

Aŭgusto 7-8: Ekonomiaj aplikoj por esperanto: ĉu nuntempa defio aŭ tasko imagebla nur por la XXI jarcento? Kun Alexandre **Rousset**.

Aŭgusto 10-14: La Esperanto-disvolvigo dum unu jarcento. Kun Claude **Gacond**.

Aŭgusto 10-14: Survoje al ekologia moralo: ekologia konscio por la pluvivo de la homaro. Kun Lev V. **Medvedev**.

Aŭgusto 10-14: Esperanta somerkurso.

Aŭgusto 14-15: Natura kuracado: la plej efika vivmaniero. Kun Pierre-Marie **Charrière**.

Aŭgusto 17-22: Lingvo-kursoj por komencantoj. Kun instruistoj de la KCE-a Instruista Skipo.

Aŭgusto 28-29: Aŭgusta studa semajnfino (kurso A por komencantoj; kurso B por progresantoj; kurso/prelego C por lertuloj: Edukado al pacaj rilatoj interkulturaj kaj interpolaj konduto. Kun Mireille **Grosjean**).

OKAZIS LA ĜENERALA ASEMBLEO DE KCE

La 27-an de februaro 1993, la asocio 'Kultura Centro Esperantista' en La Chaux-de-Fonds efektiviĝis sian **ĝeneralan asembleon**, validan por la jaro 1992. La raporto de la Direkta Komitato de KCE estis unuanime akceptita. La prezidantino, Mireille **GROSJEAN**, konstatis, ke post malfacila jaro 1992 oni povas antaŭvidi pli **sukcesan 1993**. Ŝi alvokis la esperantistaron **ne resti indiferentaj** vidalvide de la sorto de KCE.

Novaj sekretario kaj Direkta Komitato

Post la raporto pri la financoj kaj la akcepto de la laborplano, estis donitaj klarigoj pri la laborkampoj de la unuopaj membroj de la Direkta Komitato de KCE. Prezentis sin ankaŭ la **nova sekretario** de KCE, Andy **KŪNZLI**, kiu februare transprenis la sekretarian laboron de KCE de Benjamin **CHABOUDEZ**, la **demisiinta sekretario**, kaj de marto dungigis ĉe KCE kiel plentempa oficisto. Pro tiu nova tasko, Künzli formale eksigis de la Direkta Komitato, kie li funkciis kiel vicprezidanto. Samtempe anonciĝis la **demisio** de Nicole **MARGOT** (Lausanne) el la Direkta Komitato. Ŝi okupigis pri la libroservo. La ĉeestantaro dankis kaj aplaudis la rezignantinojn, kiel ankaŭ la novajn sekretariojn kaj Direktan Komitaton, kiu nun ekzistas el la prezidantino Mireille **GROSJEAN** (Les Brenets), vicprezidanto Alain **FAVRE** (Savojo), kaj membro Claude **GACOND** (La Chaux-de-Fonds). Esprimon de respekto kaj dankemo rikoltis ankaŭ la du aliaj surlokaj deĵorantoj, Mario **LEPINE**, financa administranto de GEP kaj Ahmed **AMEZIANE**, intendanto.

SVISA ESPERANTO-SOCIETO
GENERALA KUNVENO 1993
PROTOKOLO

Kvardeko da personoj partoprenis la ĝeneralan kunvenon de Svisa Esperanto-Societo la 13an de marto 1993, 11h15-12h30, 14h30-15h45, en la hotelo Steghof, Lucerno.

Malfermo

Prezidanto: Claude **Gacond** (La Chaux-de-Fonds), SES-prezidanto.
Asisto: Andy E. **Künzli** (La Chaux-de-Fonds), sekretario, protokolanto; Ernst **von May** (Oberuzwil), kasisto; Mireille **Grosjean**, Marion **Grosjean** (Les Brenets), Perla **Martinelli** (La Chaux-de-Fonds/Chiasso), komitatanoj.

Voĉnombrantoj: Lucienne **Dovat** (Lausanne), David **Buhmann** (Prilly).

Claude **Gacond** bonvenigas Perla **Martinelli**, la novan CK-aninon (ŝi estas ankaŭ ĉefredaktorino de 'Literatura Foiro').

TAGORDO

a) Protokolo de la antaŭa ĝenerala kunveno

Senkomente kaj unuanime oni aprobas la protokolon de la ĝenerala kunveno en 1992. (Noto de la protokolanto: la dato estas malĝusta: anstataŭ ĝenerala kunveno 1991 devas esti 1992).

b) Raporto de la Centra Komitato (aperinta en 'SES informas' n-ro 1/93).

Unuanime akceptita.

c) Financa raporto (aperinta kun komentoj en SI n-ro 2/93).

Unuanime akceptita.

d) Raporto de la kaskontrolantoj (dumkunvene laŭlegita de Ernst **Glättli**).

Unuanime akceptita.

e) Buĝeto por la jaro 1993 kaj kotizoj por la jaro 1994.

Post propono de la CK de SES altigi la jarkotizon por 1994 je 20% (de Fr. 50.- al Fr. 60.-; motivo: ĝenerala kreskado de la kostoj), Ernst **Glättli** (Brugg) opinias, ke tiu altigo probable kaŭzos eksmembriĝojn. Krom tio, la organo 'SES informas' (SI) taŭgas kiel modesta informilo en facile komprenebla lingvaĵo, dum 'Literatura Foiro' (LF) estus por multaj membroj tro altnivela legaĵo kaj cetere kostus al SES tro multe.

Claude **Gacond** respondas, ke unue ekzistas kotiz-kategorio, kiu ebligas sole aboni SI. Due, se SES nuligus la dissendadon de LF al la membraro, tio signifus ankaŭ rezignon pri parto de la kultura agado de la organizaĵo. Danke al LF la membraro fakte kreskis, kaj sen LF la rilatoj kun la instancoj stagnus. Rememorigante, ke LF estas servo al la membraro, Didi **Weidmann** (Zürich) emfazas, ke estas grave gardi ĉiujn tiajn servojn.

Giorgio **Silfer** (La Chaux-de-Fonds/Chiasso), farante proceduran

demandon, proponas voĉdoni unue pri la principo altiĝi aŭ ne la kotizon, due pri la kiomo de la altiĝo. La membraro konsentas pri la principo altiĝi la kotizon.

Silfer sugestas ankaŭ altiĝi la kotizon nur je 10%. Tamen, la membraro akceptas la altiĝon je 20%. La baza kotizo por 1994 do estos fr. 60.-

La buĝeto akceptiĝas unuanime.

f) Elekto de honoraj membroj

La prezidanto anoncas, ke la CK decidis nomi du novajn honorajn membrojn: Lina **Reutemann** (St. Gallen) kaj Dante **Bertolini** (Locarno). Bedaŭrinde s-ino Reutemann subite mortis la 26an de februaro 1993, tial restas nur Bertolini. Sekretario Andy **Künzli** prezentas la nekrologon de Lina Reutemann, petante momenton da silento honore al la forpasinta membrino, kaj poste la biografion de Dante Bertolini. La emocie tuŝita honorito dankeme kaj poetece reagas kaj tiel harmonie kontribuas al la solena momento, dum kiu la prezidanto enmanigis al li la honorigan dokumenton.

(La nekrologo de Lina Reutemann aperas en ĉi tiu eldono de SI; la biogramo de Bertolini kaj la teksto de lia elpaŝo en venonta eldono de LF).

g) Propoj de Lucerna Esperanto-Societo (la koncernajn tekstojn oni bv. kompari en SI 2/93, 3-5).

(La pli granda parto de tiu tagordero estis traktita post la tagmanĝo. Unuanime elektita tagprezidanto: Giorgio **Silfer**).

Propono A) Niaj taskoj, kiam esperanto estos enkondukita en Svislando, ktp.

La subskribintoj de la proponoj, Franz **Brügger**, Angelo **Mellini** kaj Paul **Scherer**, konsideras, ke la komento de la Estraro de SES ne respondas al la proponoj de LES (v. SI 2/93, p. 3-5); ili postulas tempon por doni kompletigajn klarigojn kaj forigi eventualajn miskomprenojn. La tagprezidanto donas po 5 minutojn da paroltempo al pora kaj kontraŭa pledantoj. Brügger, evidente iom kolera pro la sinteno de la Estraro de SES rapide fini tiun tagorderon, prezentas la vidpunkton de LES. Mireille **Grosjean**, prezidantino de KCE, precizigas la taskaron kaj celaron de KCE, svisa ILEI-sekcio kaj KCE-a Instruista Skipo (KIS), memorigante, ke fakte tiuj instancoj jam transprenis kaj estas plenumantaj la rolon, kiun LES dezirus doni al kreota laborgrupo. La menciitaj instancoj ne intencas monopoli la instruadon de esperanto en Svislando kaj ne pretendas okupiĝi solaj pri ĉiuj demandoj ligitaj kun ĝi. Tamen, oni finfine konsciu, ke la koncernaj strukturoj jam ekzistas kaj oni invitas ĉiujn kunlaboremulojn partopreni la tiurilatan laboron.

Didi **Weidmann**, prezidanto de Esperanto-Societo Zürich, subtenas la proponon de LES.

Silfer, rememorigante, ke SES okupiĝas principe pri informa kaj propaganda agadoj, dum KCE pri la instruado de la lingvo, faras amendan proponon al la suverena ĝenerala kunveno: aldoni punkton 'd' al la rezolucia rekomendo: "Tiu agadgrupo aktivos nur en strikta kunlaboro kun KCE, svisa ILEI-sekcio kaj CEELI."

Voĉdonado: Por la parto a de la propono (la tekston bv. legi en SI 2/93, p. 3) voĉdonas 17 pore, 9 sindetenas.

Por la parto b de la propono (la tekston bv. legi en SI, p. 3-4) voĉdonas 19 pore, 1 kontraŭe, 10 sindetenas.

Por la parto c de la propono (la tekston bv. legi en SI 2/93, p. 4) voĉdonas 24 pore, 5 sindetenas. Ankaŭ la amenda propono de **Silfer** akceptiĝas per 24 poraj voĉoj (7 sindetenoj). Surbaze de tiu ĉi decido, la propono A de LES iĝas rezolucia rekomendo al la Estraro de SES.

Propono B) Rezigno pri parto de Regionaj Kunvenoj (RK) de SES kaj lokaj asocioj (la tekston bv. legi en SI 2/93, p. 4).

Brügger komentas la proponon de LES. **Weidmann** trovas ĝin superflua. **Silfer** atentigas, ke la propono riskas esti kontraŭstatuta, ĉar en kazo de akcepto, SES, konsistanta ĝis nun nur el individuaj membroj, altrudus al autonomaj lokaj organizaĵoj (kiel ekzemple al Tiĉina Esperanto-Ligo) la propran vidpunkton; Oni ne forgesu, ke la RK estas komuna aranĝo de SES, KCE kaj la loka asocio. Tial, por ke la propono ricevu laŭstatutan karakteron, ĝi devus havi almenaŭ alian vortumon, kiel: estonte, SES ĉiujare subvenciu nur unu 2-tagan Regionan Kunvenon. Ĉar la akcepto de tiu propono ŝparigus al SES nur fr. 300.- jare (la subvencio por unu RK estas fr. 150.-), ĝi apenaŭ esence influus la financojn de SES. La proponintoj konsentas pri ĉi tiu nova vortumo. Stanisław **Pochanke** (Wil) proponas rezigni pri la aldonaĵo "l'auvice". Post fermo de la diskuto oni voĉdonas pri la modifita formulo de tiu propono: per 6 poraj kaj 14 kontraŭaj voĉoj kaj 12 sindetenoj ĝi malaprobiĝas (la propono de **Pochanke** do perdas sian signifon kaj ne estas voĉdonenda).

h) Diversaĵoj

Niklaus **WEISS** (Zug) anoncas sian demision kiel ĉefdelegito de UEA por Svislando. (Noto de la protokolanto: SI baldaŭ oficiale informos la membraron pri la nova ĉefdelegito).

ooOoo

KOREKTO EN SES INFORMAS 2/93 MARTO-APRIL

Koncernas la artikolon sur paĝo 17:

"INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO". Inter-tempe mi ricevis korekton de la adreso por aliĝoj, nome:

"CENTRE CULTUREL ESPERANTO DE MONTPELLIER
5, Rue du docteur Roux
F-34000 Montpellier".

Interesuloj bonvolu atenti pri tiu-ĉi ŝanĝo.

-FL-

ooOoo

G R A N D E G A Ĝ O J O

ekestis en la familio de la prezidanto de la Esperanto-Societo Zürich,

DIETRICH KAJ NELIDA WEIDMANN

Ĉar la 29-an de marto, je la 22.23h naskiĝis filineto

L I N D A - M I Ĥ A E L A

En la nomo de ESZ kaj SES mi tutkore gratulas kaj esprimas plej sincerajn Bondezirojn por la etulino kaj la feliĉaj gepatroj. Do, LINDA-MIĤAELA estas la plej juna esperantistino en Svislando! Ĝi estu ankaŭ la steleto de feliĉo en via familio. -FL-

*
**

La 49-a INTERNACIA JUNULARA ESPERANTO-KONGRESO IJK okazos de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto 1993 en VRACA, Bulgario.

ooOoo

KORESPONDPEŬO

Natalja Chernysheva deziras korespondi kun Svisa amiko.

ADRESO: SU-34419 ROSTOV-DON, 17 linija 5 KV20.

ooOoo

KELKAJ IMPRESOJ PRI LA SVISA ESPERANTOKONGRESO EN LUZERN, LA 13-AN KAJ 14-AN DE MARTO

Sabate la 13-an de marto 1993 kolektiĝis antaŭtagmeze kvardeko de gesamideanoj en hotelo Steghof en Luzern.

Kvazaŭ kiel invito la ampleksa libro-servo al-tiris multajn geesperantistojn. Andy Künzli, kiu prizorgis la libroservon, ĝojis pri la intereso de la gastoj. La elekto ne estis facila, ĉar prezentiĝis longa tablo kun granda nombro da libroj, gazetoj kaj informiloj.

Je la 11.15h la prezidanto, s-ro Gacond, malfermis la ĝeneralan kunvenon. La kutimaj raportoj rapide pasis, nur la budĝeto vekis diskutadon, ĉar temis pri altigo de la membrokoto. Tamen, la ĉeestantoj finfine konsentis pri altigo de 20% por la jaro 1994. Konsiderante la diversajn kosto-altigojn oni konsciis, ke altigo estas necesa. Oni pensu nur pri la afranko-elspezoj ktp.

Pli da tempo forrabis la 2 proponoj faritaj de la Lucerna Esperanto-Societo, tiel ke la antaŭtagmezo ne sufiĉis kaj ĉi-rilata diskutado okazis nur post la tagmanĝo. Detalojn vi trovas en tiu-ĉi bulteno sur paĝoj 15-17.

Surprizo estis la alveno de skipo de la Svisa Televido. Ili faris multajn surbendigojn kaj ni esperas, ke la konforma elsendo veku ankau da intereso ĉe la publiko.

Dimanĉe je la 10.00h: Daŭrigo de la forumo kaj de la kursoj.

Rigardo al la estonteco: Al la jaro 2003: la 100-jara jubileo de SES kaj de la esperantiĝo de Edmond Privat kaj Hector Hodler.

Ĝenerale vidite oni povas diri, ke la tuta aranĝo plaĉis kaj montris tamen, ke Esperanto en Svislando vivas. Precipe la juna generacio faris multe da ĝojo. Mi (FL) aŭdis diversajn vidpunktojn tre pozitivajn. Ĉiukaze por mia edzino kaj mi estis agrabla travivaĵo. -AK+FL-

Monda Kunagado vige evoluas!

En la unua jaro kaj duono de sia ekzisto, la esperantista Unesko-asocio Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo vastigis sian agadon al ĉiuj kontinentoj. Inter ĝiaj projektoj troviĝas eduka kaj trejna subteno al afrika E-komunumo, seminarioj kaj eldonaĵoj pri minoritataj lingvoj kaj kulturoj, kontraurasisma trejnado, kolektado de vivrakontoj el diversaj landoj, kaj esplorado de la rilatoj inter lingvo, kulturo kaj ekologio. En ĉiuj agadoj Monda Kunagado serĉas kunlaboron kun organizajoj ekster la Esperanto-movado.

La 6an kaj 7an de marto 1993, la Konsilantaro de Monda Kunagado kunsidis kun pluraj aktivuloj en Berlino. Oni konstatis firman bazon de la asocio: ĉ. 300 membroj en pli ol 40 landoj, sufiĉaj enspezoj por kovri la bazajn servojn, kaj kreskanta reto de perantoj kaj aktivuloj. La revuo Monda Forumo, redaktata de Mark Fettes, aperas kvarfoje jare kaj traktas plej diversajn internaciajn temojn: ekz. la 'novan mondan ordon' proklamitan de Prezidento Bush, la laboron de UN pri la medio kaj evoluigo, strategiojn por klerigo kaj pcedukado, kaj kompreneble la agadon de Unesko kaj de Monda Kunagado mem.

La ekzistokialo de Monda Kunagado, tamen, troviĝas en ĝiaj projektoj. Tre sukcesa estis la seminario pri minoritataj lingvoj kaj kulturoj en Nordio, kiun ĝi pasintjare organizis kun la nordiaj E-asocioj kaj la Samea Societo de Gotenburgo. Tia agado daŭros sub la gvido de Märtha Andreasson, kiu antaŭvidas aperigi raporton pri la seminario (en Esperanto kaj la sveda) kaj antologion de la samea kulturo (en Esperanto), kaj stimuli la organizon de similaj seminarioj en aliaj regionoj. Pludauras ankaŭ la projekto de Ulrich Becker, kolekti skizojn pri la vivo de ordinaraĵ esperantistoj en diversaj partoj de la mondo, kun la celo plivastigi komprenon pri ties kultura kaj socia diverseco.

Grandajn eblecojn de kunagado prezentas nova projekto de Annsibyll Kamphausen. Esperanto-klubo en la benina vilaĝo Cacu (naciskribe Tshatshu) komencis ĝardenkulturan projekton, por kiu ŝi jam trovis financan kaj teknikan subtenon de internacia virina organizajo. Monda Kunagado celos kunlaborigi siajn membrojn kun la ĉaĉuanoj, ne nur sur la ĝardenkultura kampo sed ankaŭ por plibonigo de la sanservoj, edukado kaj ekonomio de la vilaĝo. Se funkcios tiu eta modelo, oni esperas pri ĝia plivastigo al aliaj vilaĝoj, en Afriko kaj eble ankaŭ alikontinente.

Simile vastajn perspektivojn havas Lev Medvedev, la organizinto de la rusa AIS-sesio (28 decembro 1991 - 8 januaro 1992) pri la temaro 'lingvo-kulturo-ekologio'. Fine de 1992, Unesko decidis enmeti la aranĝon en la programon de la Monda Jardeko por Kultura Evoluigo kaj kuraĝigi ĝian pluan disvolvon. Monda Kunagado akceptis tiun taskon, kaj prioritare klopodos organizi similtajn konferencojn en aliaj mondopartoj. Medvedev mem gvidos seminarion pri ekologio en La Chaux-de-Fonds de la 10a ĝis la 14a de aŭgusto 1993.

Responde al kreskantaj zorgoj inter europaj esperantistoj, Monda Kunagado okazigos praktikan seminarion pri 'trejnado kontraŭ rasismo' en aŭtuno 1993, sub la gvido de profesia aktivulo sur tiu kampo, Elisabeth Schwarzer. Ĝis 15 esperantistoj povos, per tritaga intensa klerigado, profundigi sian komprenon pri la fontoj de rasismo kaj lerni kiel malfortigi kaj forigi ilin. Schwarzer estos ankaŭ unu el kvar kontribuantoj al la Tago de la Paco en la valencia UK, sub la temo 'Klerigo por paco en la 21a jarcento'. La Tago, kiun organizas Monda Kunagado, krom socia paco traktos ankaŭ pacajn rilatojn kun proksimuloj, pacon kaj justecon en monda skalo, kaj la ekologian dimension de paco kaj sekureco. Alia aranĝo de la Tago estos la 2a Foiro de la Paco, kiu kunigas aktivulojn pri tutmondaj problemoj por komuna diskutado kaj planado.

Pliaj detaloj pri ĉi tiuj aranĝoj troviĝas en la revuo Monda Forumo, kiun ricevas ĉiu membro de Monda Kunagado kontraŭ 30 nederlandaj guldenoj jare (por diversaj landoj ekzistas malpli alta kotizo). Por provekzemplero kaj aliĝilo skribu al Ulrich Becker, Plauener Str. 39, D-O-1092 Berlin, Germanio, aŭ al via landa peranto.

Mark Fettes

Informoj pri UEA

Universala Esperanto Asocio (UEA) estas la tutmonda Esperanto-organizo. Ĝi kunligas la unuopajn Esperantistojn kaj la landajn Esperanto-asociojn.

Ĉiu Esperantisto povas fariĝi individua membro de UEA. Kiel tia membro oni rajtas uzi la Delegitan Reton, kiu funkcias en proksimume 70 landoj en ĉiuj kontinentoj. Krome individuaj membroj de UEA povas fariĝi lokaj kaj fakaj delegitoj. Ekzistas diversaj membrokategorioj, precipe membro kun jarlibro kaj membro-abonanto. Pri la kotizoj informas vin la landodelegito kaj kotizperanto de UEA.

UEA klopodas disvastigi kaj utiligi Esperanton kaj edukas al tutmonda konscio. Tio estas ebla nur, se UEA havas multegajn individuajn membrojn, kiuj kontribuas per kotizoj. Ju pli multaj homoj parolas kaj skribas Esperanton, des pli praktike valora kaj kulture riĉa ĝi fariĝas. UEA regule okazigas la tre konatajn Universalajn Kongresojn. Ankaŭ pri ili kaj la kongreskotizoj informas vin la landodelegito.

Por havigi kotiztabelon kaj pli precizajn informojn skribu al Niklaus Weiss, Sagistrasse 20, 6300 ZUG. Sciu tamen, ke tiu ĉi adreso validas nur ĝis fine de aŭgusto 1993. Poste aliulo fariĝos landodelegito kaj kotizperanto de UEA por Svisujo. Mi dankas al ĉiuj individuaj membroj de UEA pro la fido, kiun ili estas donintaj al mi dum la pasintaj sep jaroj.

-NW-

ooOoo

La 29-aj BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET)

okazos de la 9.7.-17.7.1993 en PRIEKULI (Cesis-Regiono), en teknika lernejo.

Adreso: Organiza komitato BET29, p/k 150, Riga 50
Latvio LV-1050.

Prospekto ricevebla ĉe la redakcio de SES INFORMAS.
Bv aldoni por vi afrankitan koverton.

-FL-

ooOoo

AGADO 2003

Kutime kultura movado havas precizajn agadcelojn. La diskuta forumo de la Svisa Esperanto-Kongreso okazinta en Lucerno en marto klare montris, ke bedaŭrinde ĝis nun nebulaj estis niaj celoj. Ni paroladas pri propagando, sed ne kapablis eldoni grafike kaj enhance efikajn dokumentojn. En la bibliotekoj mankas enciklopedia verko raportanta pri la vivo kaj aktiveco de la kontribuintoj al la disvolvo de esperanto en Svislando. Tial la kulturaj kaj lernejoj, la politikistoj kaj aŭtoritatoj prave rajtas ignori nin.

La forumaj diskutoj sentigis, ke la membraro de SES deziras forlasi tiun nekontentan situacion per bone planitaj agadoj, kaj ke tiam financaj apogoj certe manifestiĝos, kiam proponiĝos subtenindaj agadoj. Fortikiĝis SES kaj solviĝis ties organizaj problemoj. Tial alvenis la momento rigardi al la estonteco kun projektoj realigeblaj.

Utila libro

La lucerna forumo komenciĝis per prelego de Andy Künzli, kiu priskribis la unuajn jarojn de SES raportante pri ties 10 unuaj prezidantoj. Kun interesaj personecoj ni konatiĝis, kaj ĉiuj ĉeestantoj esprimis al la parolinto sian interesiĝon pri la utila laboro, kiun li plenumas per esploroj pri la vivo de la svisaj esperantistoj. Ni ekkonsciis, ke la aperonta leksikono aŭ enciklopedio pri "**Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando**" estos utila libro, kiu atestos pri nia ekzisto en bibliotekoj kaj superaj lernejoj.

Nacilingvaj resumoj faciligos la konsultadon de tiu verko al la svisa klerularo, kaj tiel finiĝos la tempo, kiam oni rajtis ignori nin. Sed la verkado kaj eldono de tia libro kun fotoj kaj bildoj ne improviziĝas. La bone planita laboro de Andy Künzli indas je financa kaj teknika apogoj fare de la membraro de SES. Tial vi trovas aldone al tiu maja-junia numero de "SES informas" verdan enpagilon kun la mencio "**Agado 2003**". Ni esperas, ke dankal via malavareco la menciita libro ne bezonos atendi la centjaran jubileon de SES por troviĝi en la bibliotekoj de Svislando kaj tutcerte sur multaj aliaj librobretoj.

Trilingva varbilo

La "Agado 2003" ne limiĝos je tiu eldonprojekto. Jam nun pretiĝas la eldono de trilingva "**Minigramatiko de Esperanto**" uzebla por surstrataj kampanjoj kaj por enkondukaj kursoj. Claude Gacond verkas tiun libreton kun deko da kompetentuloj el tri lingvaj partoj de Svislando. Fine de la pasinta jaro SES kreis eldonfonduson por povi peti al la grafikisto de "Literatura Foiro" la redeseĝnadon de la antaŭviditaj bildoj. Ni menciuj, ke la koncerna kurso kaj ties bildaro estis sukcese elprovitaj dum 15 jaroj sub la formo de tre taŭga **aŭvida enkonduka kurso de esperanto**. En Lucerno Jean-Jacques Lavanchy gvidis la kurson por komencantoj pere de tiu instruilaro.

Paroliga materialo

En Lucerno la paroligan kurson gvidis Andres Bickel per interesaj ludoj, kiujn multaj ekzamenis kaj elprovis kun granda intereso. Estus bone, ke per la "Agado 2003" ni povu helpi al la eldono de la plej efikaj **paroligaj ludoj**.

Konindaj verkistoj

La jaro 2003 ne nur estos la centjariĝo de SES, sed ankaŭ tiu de la esperantiĝo de la pioniroj Hector Hodler kaj Edmond Privat, al kiuj nia movado kaj Svislando mem tiom ŝuldas. Ni esperas povi apogi eldonagadojn de la gazetartikoloj de tiuj gravaj redaktoroj. Jam nun en

AZB 8053 Zürich

PP/Journal 8053 Zürich

IMPRESSUM

Mitglieder-Information der Schweiz. Esperanto-Gesellschaft/SES

Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Herstellungsort: Copy Quick Zürich. 6x im Jahr.

Red. Telefon 01/381 77 13

Pollando Tomasz Chmielik pretigas provizoran eldonon de la **artikolaro de Edmond Privat**. Povu la "Agado 2003" akceli tiun publikigon kaj konigi ĝin en universitatajn mediojn. Studentoj trovos en ĝi riĉan materialon por doktoriĝaj esploroj.

Informmaterialo

Kelkaj certe demandos, ĉu estas antaŭvidita la **eldono de informmaterialo**? Ni jese respondas. Sed tiu materialo devos esti enhave kaj grafike altnivela. Tial ni submetos niajn projektojn al fakuloj. En ĉiu lingvoregiono de Svislando ni provos formi laborgrupon, kiu kolektos ideojn, laborigos kompetentulojn kaj kontrolos la efikon de la eldonota materialo. Via apogo al la "Agado 2003" ankaŭ akcelos tiun aktivecon.

Malavaru

Tial ni vigle alvokas: **Kunlaboru per vigla financa apogo pere de la verda enpagilo "AGADO 2003"**, kiu akompanas tiun majan numeron de "SES informas".

Nome de la Estraro de SES antaŭdankas la prezidanto.

-oOo-

La redaktfino de "SI" 4/93 estas la 15-a de junio 93.